

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 51, Majo 2022



Magazino por kulturo kaj plezuro

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

# Enhavo

Enhavo.....	2	Marĉostrigo – Jorduggla .....	22
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Monata raporto pri Esperanto-agado.....	23
Espeporko meditas.....	3	El RD Kongo: Espoir Kasati rakontas .....	24
Printempo estas tempo por urtika supo.....	3	Kiuj estas la irokezoj?.....	25
Tramoj en Gotenburgo.....	4	La signifoj de la nomoj de la Usonaj ŝtatoj ..	27
La tipa gotenburgano Kal en tramo .....	4	Investo en la minoritataj lingvoj.....	29
Gotenburga ŝerco.....	5	La neceso uzi la ĝustajn ciferojn en adresoj	30
Sommardagar i Göteborg.....	5	Ĉu ankaŭ la vikingoj havis zorgojn pri	
Esperanto-sabato 23 aprilo.....	6	la klimato?.....	30
Paul de Beurs rakontis pri sia hejmlando.....	7	Puŝiĝi en la muron .....	31
Pri paskaj tradicioj en Ĉeĥio informas		Svedaj pioniraj inoj .....	32
Josef Kříž.....	13	Printempa promeno de "Järntorget" laŭ	
"Resurektaj Ovoj – Uppståndelseägg" .....	14	"Linnégatan" .....	33
Pollando ricevas multajn rifuĝintojn el		Poemo de dekjara Adam memore al sia	
Ukrainio .....	14	forpasinta hundo Genki .....	36
Dolĉaj Svedaj bomboj! .....	15	Jen nia mondo! .....	36
Ujguroj.....	16	Aira Kankkunen (1928–2010) –	
La monda preslibereco.....	17	Esperanta verkistino en Gotenburgo.....	37
Sinebrychoff – Artomuzeo en Helsinko.....	18	Printempo – venu! .....	38
Kristian Lundberg forpasis.....	21	6 demandoj pri pilkludoj.....	39

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@gmail.com](mailto:ingegerd.granat@gmail.com). Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).

**Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato (neniu gazeto en julio). Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.**





## Espeporko meditas



- ☆ La **maja floro** de 2022 estas blanka. La floroj vendiĝas por kolekti monon por infanoj – malsanaj infanoj, malriĉaj infanoj. Ĉiun jaron venas ĉirkaŭ mil proponoj pri la koloroj de la majfloro de la venonta jaro al la Majflora komitato. Dekjara Oscar Björklund gajnis la konkurson de la floro de 2022. Li diras: "Mi ekpensis pri fritita ovo – flava kaj blanka. Poste mi ekpensis ke la maja floro estas kiel protekta ŝelo por infanoj kiuj bezonas apogon".
- ☆ La **tramoj de Gotenburgo** estas blujaj. Familio de Stokholmo iam translokiĝis al Gotenburgo. La familianoj konfuziĝis pro la konsiloj de gotenburganoj: "Iru per la bruna tramo!" aŭ "Iru per la flava vagono!" Ĉiuj ja estas blujaj. Tamen temas pri la fono de la ŝildoj, kiuj indikas la destinon de ĉiu tramo. Ili havis malsamajn kolorojn.
- ☆ **Arto kaj muziko** gravas dum maltrankvilaj tempoj. Ĝuu la pentrojn el finna artmuzeo kaj aŭskultu muzikon de sveda pionira orgenisto kaj komponisto. Vi ankaŭ povas aŭskulti "Jen nia mondo" – unu el la plej oftaj kantataj esperantaj kantoj.

- ☆ Ĉu vi scias kio estas **resurektaj ovojoj**? Ĉu vi scias kie loĝas la **ujguroj**? Ĉu vi scias kiuj estas la **irokezoj**? Ĉu vi scias kion signifas la **nomoj de usonaj ŝtatoj**? Ĉu vi konas la nomon de la **fabela nederlanda knabo**, kiu per sia montrofringo en truo de la digo malhelpis ke la maro inundu lian landon? Bonŝance vi trovos la respondojn en Ora Ĵurnalo!
- ☆ La **migrula gastejo de Slottsskogen** estas bona elekto por vi, se vi intencas partopreni la someran kurson en Gotenburgo.
- ☆ **Perdi maljunan amatan hundon** estas por 10-jara knabo grandan malgajon kaj mankon. **Perdi 56-jaran verkiston**, kiu ankoraŭ povus verki dum pluraj jaroj, estas ankaŭ manko, eĉ se ni ne persone konas lin.
- ☆ **Promenu kune kun Ingegerd en Gotenburgo** kaj aŭskultu la historion pri la diablo sur la muro de Linnégatan 9!
- ☆ Fine legu la **novelon pri la printempo** de Aira Kankkunen.
- ☆ Ni renkontiĝu dum la **somera kurso** antaŭ somermezo! /Siv

## Printempo estas tempo por urtika supo

Tralavu la urtikojn kaj brogu ilin. Elprenu ilin per truita ĉerpkulero. Haku ilin aŭ pecetigu ilin per miksililo. Se la urtikoj ne estas kolektitaj ĉe trafikplena vojo, vi povas uzi ankaŭ la kuirakvon en la supo. Faru densigaĵon per butero kaj



tritika faruno, aldonu la urtikojn kaj diluu la supon per la urtika kuirakvo aŭ vegetara buljono. Prove gustumu kaj spicu per salo, pipro kaj ŝenoprazo. Surtabligu aldoninte duonojn de boligitaj ovojoj. Bonan apetiton!

# Tramoj en Gotenburgo

## Konekse kun la bildo de la unua paĝo – jen iomete pri la gotenburgaj tramoj.



Kun sia longo de 161 km, la Gotenburgo-tramo estas la plej granda tramsistemo en la norda regiono. La tramoj formas la spinon de la publika transporto de Göteborg kaj kovras grandajn partojn de la urbaj areoj de Göteborg kaj Mölndal (du najbaraj urboj, kiuj kunkreskis).

La linioj ĝenerale surveturiĝas ĉiujn dek minutojn dum pinthoroj. Estas ĉirkaŭ 2 400 vojaĝoj kaj ĉirkaŭ 36 000 km, preskaŭ unu rondvojaĝo ĉirkaŭ la mondo ĉiutage entute. Nombro da haltejoj: 133. Nombro da linioj: 12 regulaj, 1 muzea linio. Ofteco: 3–10 minutoj.

La unuaj tramoj de Gotenburgo estis tirataj de ĉevaloj. Angla entrepreno funkciigis la unuan linion en 1879 – inter Brunnsparken kaj Stigbergsliden. Fakte la linioj ankaŭ havas daŭrigon en la maron. Oni nomas la boatojn, per kiuj oni atingas la insulojn ekster Gotenburgo, "la tramoj de la maro".

**1879** Angla firmao malfermas Gothenburg Tramway Ltd kaj enkondukas la unuan tramlinion de Göteborg. La vojaĝo kostas 10 oeroj.

**1899** La urbo Gotenburgo elaĉetas la koncesion de la angla kompanio kaj transprenas la tramojn. La prezo estis £ 70,000.

**1902** La elektra tramo estas inaŭgurita.

**1907** La tramo iras ekster la urbolimojn (Mölndal- kaj Långedrag-linioj).

**1919** La unua prezaltiĝo en 40 jaroj – de 10 ĝis 15 oeroj.

**1921** Pli grandaj ĉaroj estas metitaj en servon. La monerskatoloj malaperas, biletoj estas enkondukitaj.

**1940** La tramoj atingas Hisingen.

**1956** La kuponsistemo estas enkondukita kun tarifoj rilataj al la longeco de la vojaĝo.

**1957** La komunikada radio estas uzata.

**1967** Biletmaŝinoj estas lanĉitaj kaj malmendigo de la konduktora sistemo komenciĝas.

**1969** La unua etapo de la tramo al Angered estas malfermita.

**1991** Magnetaj karto anstataŭigas la kuponsistemon.

**2006** La unuaj vojaĝantoj elaĉetas ununuran bileton per SMS.

**2012** Nova nacia leĝo pri publika transporto ekvalidas.

**2019** Marde la 24-an de septembro, la tramo fariĝis 140-jara kaj ĝi estis festita la sekvan sabaton per granda festo en Drottningtorget.

/Siv

## La tipa gotenburgano Kal en tramo



Estis iom juna Kal, kiu unu tagon eliris el la tramo sen fermi la pordon. Maljuna sinjorino, kiu sentis sin malvarma en la tramo vokis iom sarkasme post li:

– Aŭskultu, ĉu vi ne havas pordon en via hejmo?

Kal turnis sin, enŝovis la kapon kaj respondis:

– Tion ni ja havas, eta onklino, sed d----e, ĝin oni ja ne kunprenas en tramo ĉu?

# Gotenburga ŝerco

– Vi, obstina azeno! Ĉu mi devas tiri vin al la esperanta lingvejo?

Unu el la artaĵoj sur la flagstango en la adreso "Packhusplatsen 5".

La skulptisto estas Arvid Bryth 1905 – 1997.

/Ingegerd



*Sommardagar i Göteborg 2022 -  
Välkommen till en kurs i  
Esperanto*

– ett logiskt och spännande språk med globala ambitioner.



**Plats:** Vuxenskolan, Karl Gustavsgatan 15, Göteborg. **Grupper** på tre olika nivåer. **Tid:** må 20 juni – to 23 juni kl. 10 – 15. Sista dagen gör vi en halvdagsutflykt och prövar att tala esperanto. Avgift 100:–/dag = 400:– Studerande ungdom – halva priset.

**Arrangörer:** Göteborgs Esperantoförening, Esperanto-lärarnas förbund ( ILEI ) och Studieförbundet Vuxenskolan. Läs mer på vår hemsida: [www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org).

**Esperanto-Societo de Gotenburgo**

e-post: [gbg@esperanto.se](mailto:gbg@esperanto.se) ; pg. 436 12-1 Mer info: Siv Burell : [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com)

## Du bildoj el la somera kurso en 2018:

### 1. Ekster la kursejo.



### 2. Kvar pollandanoj helpis nin ne krokodili.



Ĉu ĉisomere venos eksterlandanoj? /Siv

# Esperanto-sabato 23 aprilo



La menditaj ĉemizoj finfine alvenis.

De la maldekstro: Siv Burell, la preleganto **Paul de Beurs**, Margareta Andersson kaj Ingegerd Granat.

Komuna teksto: ESPERO kaj super ĝi povas esti konturo de elefanto aŭ leono, protektindaj bestoj!



La publiko lernis multon pri Nederlando.



Ne plu la iama korona-distancoj!

# Paul de Beurs rakontis pri sia hejmlando

Jen kelkaj el liaj bildoj.

## Nederlando, la malalta lando



Dio kreis la mondon,  
sed la nederlandanoj  
kreis Nederlandon

## Kiel ĉi tio rilatas al Nederlando?



Lignoŝuoj

Muelejo

## Kial tiom granda diferenco?



Amsterdamo



Roterdamo

Turistoj preferas Amsterdamon, sed laŭ Paul, Roterdamo estas pli interesa. Dum la dua mondmilito la urbo estis parte detruita, sed nun ĝi estas vivanta moderna havenurbo.

# Nederlando kontraŭ Svedio



.11 fojojn pli malgranda

.duoble pli da loĝantoj



## La ŝanĝiganta lando



ĉirkaŭ la jaro 0



ĉirkaŭ la jaro 1350



Mikso de sala kaj dolĉa akvo

## Konstrui digojn





# Pumpi...



Malnovaj kaj modernaj pumpmetodoj



Jen fabelo pri Hansje Brinkers, knabo, kiu trovis truon en la digo kaj per sia montro-fingro malebligis por la maro eniri la landon.

## 1953, granda katastrofo



# La respondo



# Havenoj kaj komerco



# La kolonioj




## Riĉeco kaj la nigra paĝo.....



## Nederlandaj pentristoj



*Vincent van Gogh*



*Pieter Mondriaan*

## Oranĝkolora; kiel li nomiĝas?



*La reĝo de Nederlando, Willem Alexander*

# La dua monda milito



Persekutoj de judoj



Bombardo de Amsterdamo Roterdamo

## Internacia atento – libereco



## En Roterdamo

Nederlando estas riĉa je historio – ankaŭ je Esperanta historio. Dekstre estas ja la konstruaĵo, kie UEA havas sian Centran Oficejon.... Sed kiom longe?

**Ni kore dankas al Paul pro lia prezentado!**

Ne ĉiuj bildoj havis lokon en Ora Ĵurnalo. La redakcio elektis.



# Pri paskaj tradicioj en Ĉeĥio informas Josef Kříž

Elpeto de ovoj pere de paska vergo.



Ornamentaj ovoj.



Grupo de paskaj elpetantoj.



Ovoj kaj paskaj kukoj.



En nia lando estas tia kutimo farbi aŭ ornami multkoloraj paskajn ovojn. Oni uzas plejparte la ovojn kokinajn. Ne tro ofte estas konataj ornamitaj eĉ la ovoj anasaj kaj anseraj. Ekzistas diversaj metodoj, kiel farbi aŭ iamaniere ornami la ovojn. En nia familio ni preparas ornami ovojn helpe de fandita abela vakso. Unue ni boligas ovojn. Post kiam ili malvarmiĝis ni uzas pinglon kun kapeto



Nun mi ankoraŭ sendas al vi bildon de la ovo ornamita pere de abela vakso – tiun ĉi ovon ornamis mi mem – Amike! *Josef*



iomete enigita en la lignan krajonon. La kapeto estas trempata en vakson kaj diversaj ornamaĵoj estas permane kreataj. Poste oni metas la ovojn laŭgrade en poton kun farbo (dume mi jam preparis kelke da potojn kun farboj de diversaj koloroj). Post kelkaj minutoj oni elprenas la ovojn el la potoj. Kiam la ovoj sekiĝas, mia edzino atenteme forigas la abelan vakson de la iomete varmigita ovo (ekz. super malgranda kandela flamo) pere de mola tuko. Kie estis vakso, restos nekoloraj lokoj – fakte blankaj ornamaĵoj. /Josef

## ”Resurektaj Ovoj – Uppståndelseägg”

katolika paska tradicio, kiun ankaŭ ni en Svedio praktikis, antaŭ ol ni fariĝis luteranoj.

Walter Klag trovis bildojn pri ”Resurektaj Ovoj” en filmo pri la muzeo de Sigtuna. Sigtuna estas urbeto kie ”la historio de Svedio komenciĝis”.



*La Resurekta ovo de Kiev. Uppståndelseägget från Kiev. Temas pri keramikaj ovoj.*

Preskaŭ ĉion, kion ni scias pri la frua historio de Sigtuna ni elfosis el la tero.

Aŭskultu la rakonton de la la arkeologo pri la ovoj de Kiev. Ili simbolas la relevigon de Kristo kaj estis faritaj en la areo, kiun ni nun nomas Ukrainio:

<https://www.youtube.com/watch?v=aKUHAM-lbmU>

Ekde 1910 oni faris arkeologiajn elfosojn en la nigra tero de Sigtuna. Gravis ekscii, kiom aĝa Sigtuna estas. En 1990 oni konfirmis ke la fondado okazis dum la 970a jardeko pro iniciativo de la reĝo Olof Skötkonung, nia unua kristana reĝo.

En Sigtuna li stampigis la unuajn svedajn monerojn.


Resurektajn ovoj de Kiev oni ankaŭ trovis en Gotlando. /Siv



## Pollando ricevas multajn rifuĝintojn el Ukrainio

Elwira Twardowska sendis ĉi tiujn bildojn:





...kaj de Lucina, fratino de Elwira, kaj ŝia edzo Marek, venis la jena Paska karto kun salutojn al ĉiuj gotenburganoj, kiujn ŝi renkontis en 2018.



## Dolĉaj Svedaj bomboj!

Renate kaj Walter KLAG, Vieno



1926 inventis la kukaĵisto Walter Niemetz [valter nimec] en Vieno la tiel nomitan Svedan bombon (Schwedenbombe [ŝvédenbómbe]). Tiu ne-vegana dolĉaĵo havas rondan bazon el vaflo kaj supre ĉokoladan glazuron kun aŭ sen kokosraspaĵoj. La interno konsistas el meringa pasto. Diametro 4 cm, alteco 5 cm, maso 18 gramoj. La formo estas cilindro kun kupolo supre. Nutra energio: 293 kiloĵuloj.

Kemia konsisto, laŭ la ofteco:

Sakarozo, ovoblanko, planta graso, glukozaj siropoj, kokosraspaĵoj, kakao, tritika faruno, sojofaruno, lakta pulvoro, gelozo, sojolecitino, karamela siropo, ovoflava pulvoro, vanila aromo.

Oni vendas po ses Svedajn bombojn en travidebla plasta ujo, kiu similas al pakumo por ovoj. Ses kostas 2 eŭrojn (20 svedajn kronojn).

2019 ŝteliĝis en Malsupra Aŭstrio (unu el la naŭ federaciaj landoj de Aŭstrio) la ŝarĝo de kamiono. Malaperis 160 mil Svedaj bomboj.

Simila produkto estas populara en Germanio. Unue tiu nomiĝis "Mohrenkopf" (maŭra kapo) aŭ "Negerkuss" (negra kiso). Hodiaŭ oni preferas esti politike korekta, tial oni nomas tiun frandaĵon "Schokokuss" (ĉokolada kiso).

Ĉu la nomo "Sveda bombo" estas diskriminacio? Alternativa nomo estus "Volapuka bombo".

## La Sveda armeo antaŭ Vieno

Dum la Tridekjara Milito (1618 ĝis 1648) svedaj trupoj dufoje estis antaŭ Vieno. En 1619 la bohemia nobelo Matthias THURN, generaleŭtenanto en la armeo de la sveda

reĝo Gustavo Adolfo la dua, sieĝis Vienon, sed vane. La atako de la sveda generalo Lennart TORSTENSON estis pli danĝera: En marto 1645 dum kvar tagoj la svedoj pafis al Vieno per kanonoj, sed ne kaŭzis grandan damaĝon. Post retiriĝo ili reatakis Vienon en aŭgusto. Nur en aŭgusto 1646 la trupoj de la germana imperiestro Ferdinando la dua kapablis definitive venki la svedojn.

**Komento: Post 200 pacaj jaroj, ni svedoj malfacile komprenas, ke ni iam estis militemaj, rabinadis kaj detruis urbojn en Eŭropo. Sed ĉokoladajn bombojn ni nun volonte disvastigu! Bonan apetiton! /Siv**

## Ujguroj

Kiam la mondo direktas sian atenton al Ukraino, la ĉinoj daŭrigas sian genocidon de la ujguroj. Tion **Riksablo de Anglio** notis, leginte artikolon en Global Voices.



### Ujguroj – el Vikipedio



**Global Voices** spegulas okazaĵojn de la tuta mondo. Kiam nun la fokuso estas sur Ukraino, Global Voices ankaŭ lumigas aliajn krimojn kontraŭ homaj rajtoj: En

marto ties fokuso estas sur la ujguroj, kiuj ekde multaj jaroj alfrontas genocidon fare de Ĉinio.

Ĉirkaŭ 10 milionoj ujguroj loĝas en Xinjiang, en okcidenta Ĉinio. La plejparto estas sunimuslimoj. Antaŭe oni nomis ilin "orientaj turkoj". Ĉinio strebas fari ilin ĉinoj kaj translokigas multajn han-ĉinojn al la okcidenta Ĉinio por minimumi la procentojn de ujguroj. Sed la ujguroj volas protekti sian propran lingvon kaj kulturon.

### Jen citaĵoj el Global Voices:

"[...] En Orienta Turkestano [...] ujguroj estas devigitaj danki Ĉinion, kiu okupas ilian patrujon kaj kies registaro, malobservis iliajn rajtojn kaj prirabis ilian riĉaĵon. Tiuj, kiuj ne montras dankemon al Ĉinio, estas malliberigitaj pro suspekto pri separatismo, terorismo kaj ekstremismo". Milionoj da homoj fuĝis en kaj el Ukrainio por savi siajn vivojn. Ujguroj ne rajtas moviĝi de unu kvartalo al alia sen permeso.

"[...] Laŭ ujguraj aktivuloj pli ol 500 kadavroj estas liveritaj al siaj hejmoj ĉiutage el la koncentrejoj, sed nur Dio kaj ĉinaj oficaluloj scias la vere totalan nombron de mortintoj. Neniu scias kiam la "proceso" de genocido estos finita. [...]"

Kion ujguroj trovas plej interesa pri la ukraina



situacio estas la internacia atento pri ĝi. Se ukraino perdas sian vivon kiel rezulto de ĉi tiu milito, la amaskomunikiloj raportas tion. Tamen la terura situacio de ujuguroj altiras malmulte da monda atento. Ekzemple, kiam 150 homoj mortis en unu el la 380 koncentrejoj de la ujugura regiono, neniu krom la ujugura servo de RFA (Radio Free Azia) en Usono volis aŭ povis raporti ĝin.

[...] En la ujugura kazo, la mondo donis al Ĉinio la Vintrajn Olimpikojn dum la ujugura genocido estis okazanta.

[...] Ukrainoj havas la kapablon determini kun kiu kaj kiam ili geedziĝas, dum ujuguraj virinoj

estas devigitaj edziĝi kun la han-ĉinoj, kiuj okupis la landon, kaj iliaj infanoj (ĉirkaŭ 500 000) estas kondukitaj al orfejoj en interna Ĉinio for de sia patrujo.

[...] Ĉi tiu milito en Ukrainio [...] donas al Ĉinio oran ŝancon kaŝi la ujuguran genocidon dum kvin ĝis dek pliaj jaroj, ĝi tiel alproksimiĝas al sia fina celo ekstermi ujugurojn de la tero.”

*Mi enmetis la parton "Ujuguroj – el Vikipedio".*

/Siv

## La monda preslibereco – laŭ Raportistoj sen Limoj



Blanka – bona

Flava – kontentiga

Oranĝa – problema situacio

Ruĝa – grave problema situacio

Nigra – treege grava situacio



La 3an de majo oni festenas la Internacian Tagon de Preslibereco. Svedio estis la unua lando de la mondo, kiu faris leĝon pri preslibereco – antaŭ 256 jaroj.

En Svedio ekestis la organizo: "Raportistoj sen limoj" en 1994. Tamen Francio estis pli frua – jam en 1985 troviĝis tie "Reporters Sans Frontiers" – RSF. /Siv

**La sveda presleĝo de 1766**


# Sinebrychoff – Artomuzeo en Helsinko

de Raita "Saliko" Pyhälä



*La Muzeo Sinebrychoff en la Bulvarado, Helsinko.*

En la Bulvarado de Helsinko staras trietaĝa domo, kiun siatempe konstruigis, por sia familio, unu el la plej riĉaj helsinkanoj, Paul Sinebrychoff (1799 – 1883). Ĉar li donis la saman nomon al sia filo, oni distingas ilin aldonante "maljuna" kaj "juna" post la familia nomo. Malantaŭ la domo etendiĝas parko sur deklivo.



*Fanny kaj Paul la juna.*

La muzeo enhavas ne nur la artaĵojn, kiujn Paul la juna dum trideko da jaroj kolektis kun sia sveddevena edzino Fanny, sed ankaŭ ilian muzeigitan hejmon, kiun oni restaŭris post la dua mondmilito uzante malnovajn nigrablankajn fotojn kaj skribitajn notojn.

Dum la milito la artaĵoj estis gardataj en pli sekura loko kaj la domo mem estis uzata por aliaj bezonoj. Post la milito la domo estis uzata ankaŭ kiel Teknika Lernejo, pro kio ĝi estis draste ŝanĝita. Kiam la tempo kaj mona situacio permesis, oni konstruis por la lernejo novan, pli taŭgan ejon, kaj la Sinebrychoff-domon oni provis refari tia, kia ĝi estis en la jaro 1921 kaj pli frue. La muzeo estis malfermita en 1980 kaj la domo leĝe protektita en 1985. En la plej suba etaĝo nun troviĝas ejoj por pakado, konservado kaj stokado.



*En la Empira salono.*

Fanny Sinebrychoff (1862 – 1921), antaŭ sia fianĉiĝo kun Paul, aktoris en 85 diversaj roloj

en la Sveda Teatro de Helsinko, sed post la edziniĝo ŝi dediĉis sin al la hejmo, al meblado kaj dekorado, al la kolektado de arto, kiu estis iliaj komunaj ŝatokupoj. Ŝi kreskigis florojn kaj palmojn en la korbelfenestro de la dua etaĝo. Aldone troviĝis forceja plantodomo, florbedoj kaj tri karpolaĝetoj en la kvinhektara parko-ĝardeno. La Sinebrychoffoj lasis siajn laboristojn kaj aliajn helsinkanojn ĝui de la parko, nur vespere ili fermis la pordegojn. Fanny kelkfoje invitis infanojn de aziloj kaj orfejoj festeni kaj ludi en la parko. Paul kaj ŝi restis seninfanaj. Post ili neniu en Finnlando plu havas la familian nomon Sinebrychoff. Ili samopiniis, ke ili donacu siajn 30-ĉambran hejmon kaj artaĵojn al la finna ŝtato.



*La kurba sofo de la caro.*



Kiam ni eniras la muzeon en la dua etaĝo, ni unue rigardu la hejmon. Ni trovas grandan luksan Empir-salonon kun palmegoj, sofoj, foteloj, tabloj, ŝrankoj. La origina kurba sofo venis de rusa kastelo kaj onidire iu caro posedis ĝin. Ĝin kaj la brakseĝojn kovras flava silko. Sur iu tablo vidiĝas arĝenta horloĝo de Zacharias Beck, kiu enhavas ok rulojn de diversaj melodioj. Ĝi estis donacita de Paul al Fanny kristnaske. En la gustav-epoka konversaci-ĉambro la helruĝa silko de la remburitaj seĝoj venis de Bukowski en Stokholmo. La murojn kovras pentraĵoj kaj miniaturoj, supre la plej grandaj kaj malsupre




*En la plafono.*

la plej malgrandaj: portretoj, pejzaĝoj, aranĝaĵoj. Ju pli da historio scias la vizitanto, des pli interese al li aspektas la kolekto pri ŝtataj kaj politikaj famuloj kaj gravuloj. La luksan etoson kreas multekostaj kurtenoj, orientaj tapiŝoj, kristalaj lustroj, plafonoj ornamitaj diversmaniere en ĉiu ĉambro.



*Ecce Homo de Jusepo de Ribera.*



*Sankta Nikolao rusa ikono de la 15a jarcento.*

La Sinebrychoffoj estis ortodoksuloj. Unu ĉambro enhavas ikonojn kaj aliajn religiajn pentraĵojn: Ecce Homo de Jusepo de Ribera, Ikono pri Sankta Nikolao, pluraj pentraĵoj pri la Madono. En la koridoroj oni povas preterpasi statuojn de Sergel: Eroso kaj Psiĥa, Faŭno. En alia loko la dormanta Amoro de Thorvaldsen. En la ŝrankoj de la manĝejo vidiĝas servicoj, orientaj porcelanaĵoj, arĝentaĵoj, kalikoj kaj pokaloj. Entute la kolekto de Sinebrychoffoj enhavas ĉirkaŭ 900 aĵojn. Al ĝi la finna ŝtato aldonis sian kolekton de pentraĵoj de la 17a kaj 18a jarcentoj en Eŭropo.



*Madono.*



*Eroso kaj Psiĥa de Sergel.*



*Faŭno de Sergel.*



*Dormanta Amoro de Thorvaldsen.*

En ribela tempo Paul Sinebrychoff maldormis, kun pafilo ĉe la mano, por defendi sin kaj siajn posedaĵojn, sed neniu atakis. Onidire la bona famo de lia bonfarema patrino Anna protektis la tutan domon. La malriĉaj urbanoj memoris, ke la Sinebrychoffoj ĉiam provis helpi homojn, kiuj la helpon bezonis.

En la ĉambroj ekster la hejmo de Fanny kaj Paul ŝanĝiĝas ekspozicioj. En la komenco de la jaro 2022 viziteblas ekspozicio pri Carl von



*Anna Sinebrychoff – Kjöllfeldt, fratino de Paul la maljuna – "Patrino de la malriĉuloj".*

Linné kaj lia influo al la kreado de ĝardenoj kaj floropentraĵoj. Apud unu pentraĵo troviĝas nekredebla flora brodaĵo de Anna Sinebrychoff, fratino de Paul la maljuna. Li havis du fratinojn, ambaŭ estis edukitaj en la tiama maniero de nobelinoj. Li mem inter siaj parencoj estis la unua, kiu abiturientiĝis.

La Sinebrychoffoj venis al Finnlando el Rusio en la fino de la 18a jarcento aŭ en la komenco de la 19a jc per ĉaro kaj ĉevalo, modesta geedza paro kamparana kun pluraj infanoj. Iom post iom ili sukcesis riĉiĝi per brando kaj biero, per negocoj, akcioj kaj



*Brodaĵo de Anna Sinebrychoff.*

obligacioj. En Finnlando ili fondis bierfarejon en 1819, la unuan en Nordio.

Somere en la stratoj proksimaj al la nuna muzeo oni kelkfoje povas vidi ĉevalparon tiranta ĉaron ŝargitan de biero al iu restoracio. Tio estas farata por ne forgesi la pasinton. El la nomo Sinebrychoff restas la biermarko Koff. La bierfarejo Sinebrychoff estis unuigita kun la dana firmao Carlsberg.

Kiam la tempoj estis tre maltrankviligaj en Finnlando, kaj Paul S. la juna maldormis por defendi sian posedaĵon (ĉirkaŭ 1917), li kaj edzino Fanny pensis, ĉu donaci la artaĵojn al la sveda Nationalmuseum, ĉar ili timis, kio okazos al ili en Finnlando.

*Raita "Saliko" Pyhälä*

## Kristian Lundberg forpasis

Inga Johansson skribas:



Kristian Lundberg, naskita en 1966, debutis en 1991 per la poemaro "Tra septembro" kaj ofte priskribis en siaj verkoj la malfacilan edukadon en laborista hejmo en Malmö.

En la romano "Yarden" – La Korto, li skribis pri sia malfacila tempo kiel laboristo en parkejo en Malmö-haveno, tasko kiun li prenis por administri impostan ŝuldon.

La libro ricevis multe da atento kaj ekviviĝis kaj en teatro kaj kiel filmo 2016.

En la malfruaj 80'oj kaj fruaj 90'oj, Kristian Lundberg iĝis parto de grupo de junaj poetoj kiuj nomis sin la Malmö Ligo.

Kristian Lundberg fariĝis 56-jara.

---

**"La korto", leginda romano, verkita de Kristian Lundberg, tradukita en Esperanton de Gunnar Gällmo. >**


Ligiloj:

<https://katalogo.uea.org/index.php?inf=2814&id=1619&recenzo=montru>

<http://hjohnson.blogspot.com/2012/04/yarden-kristian-lundberg.html>

[https://sv.wikipedia.org/wiki/Kristian\\_Lundberg](https://sv.wikipedia.org/wiki/Kristian_Lundberg)

<https://www.vk.se/2022-04-27/forfattaren-kristian-lundberg-ar-dod>




"La Korto" temas pri senŝirmeco kaj travivado, pri la kondiĉoj de la laboro kaj pri mono – haveblo sed ĉefe malhaveblo de mono. Estas ankaŭ rakonto pri la junaĝo de la verkisto en la ombra parto de la socio.

Kaptita en maŝaro de ŝuldoj, Kristian serĉas laboron en la plej multspecaj lokoj. Fine li estas dungata en la haveno de Malmö, en "La Korto", inter la homoj pohore dungitaj de laborperanta entrepreno, kun la plej aĉaj laborkondiĉoj. Li movas aŭtojn sub severa kontrolo kaj en ĉiuj veteroj. Malrapide la reveno al la korpa laboro, kiu ekis lian profesion vivon, iĝas vojaĝo reen al la infanaĝo, sed ankaŭ kvitiĝo kun la kondiĉoj de la moderna laborvivo.

Kristian Lundberg faras inversan klasvojaĝon, kie la jaroj ĉefe dediĉitaj al verkado subite ŝajnas interludo. Li reiras al la mondo de kie li unue venis. Ne pro nostalgiaj kaŭzoj, sed ĉar ne troveblas alia solvo.

# Marçostrigo – Jorduggla

de Renate Säfström



Subite ĝi sidis tie sur la paliso,  
prilumita de la lastaj briloj de la tago

– Marçostrigo!

Gvatis scivole min dum kelkaj sorĉaj minutoj  
antaŭ ol ĝi sensone flugis pluen  
super la strandaj herbejoj oriente en  
Oelando.

Neforgesebla momento.

Dankemo kaj miro.

Så satt den där på stolpen,  
belyst av dagens sista strålar

– en Jorduggla!

Kikade nyfiket på mig under några magiska  
minuter  
innan den ljudlöst flög vidare  
ut över strandängarna vid östra Öland.

Ett oförglömligt ögonblick.

Tacksamhet och förundran.



# Monata raporto pri Esperanto-agado



Espoir Kasati

3 apr. 2022

Tio ĉi estas mia monata raporto al Afrika komisiono de UEA kaj Afrika Centro Esperantista. Mi volas ke vin atingu la skribaĵoj pri mia poresperanta laboro en Afriko.

## PRI ĈEESTA AGADO

Ekde la pasinta Marto 2022 en Lubumbashi sukcesis kreiĝi nova Esperanto Klubo. Lubumbashi estas la dua urbo de la Demokratia Respublika Kongolando, situanta relative sude de la lando en la provinco Haut-katanga (alta katango).

La Klubo komenciĝis kun tri lernantoj, sed tuj poste aldoniĝis aliaj du, ambaŭ estas knabinoj ne pli aĝaj ol 17jaraj. La kurso okazas fizike fare de instruisto ESPOIR NGOMA KASATI surloke. Promesojn veni al ni donadas homoj kiuj preterpasante iamaniere interesiĝas pri la belsona neŭtrala internacia lingvo Esperanto. La klopodo starigi la unuan klubon en Lububaŝo estas efektiva danke al la subvencio oferita de la Afrika Centro Esperantista, kiun mi uzis por aĉeti materiojn por fari la verda-blankan tabulon, aĉeti kretojn. Mi persone, kaj mia tuta klubo ĝenerale estas tre dankaj al ACE por tiu helpo kiu malfermas enireblojn al nova esperantista klubejo en tiu suda parto de la D.R. Kongo.

## PRI RETA E-INSTRUADO

Ekde septembro 2021, estinte en Tanzanio mi iniciatas retan esperanto-instruejon en la kadro de **Kampanjo HANS BAKKER** lanĉita de la Afrika Komisiono de UEA. Mi unue lanĉis informojn rete, poste varbis interesitojn kaj registris ilin laŭ **EPI-IPE-bazoj**. La klubon mi ekis kun almenaŭ tridek lernantoj; unuj

forlasis la kurson pro manko de dat-volumoj, elektro-energio por ŝarĝi ties telefonbateriojn, aliaj foriris pro ne klarigitaj kialoj, sed mi daŭrigis kun pacienuloj ĝis nun tiuj lastaj lernas kaj kies lingvo-nivelejn mi povas taksu bonaj ĉar unu el miaj retlernantaj lernantoj trapasis lingvotestan ekzamenon kaj akiris la diplomon pri la nivelo B2 laŭ "Lingvo Testa Sistema de la Esperanta Civito". La ĝisnuna nombro de rete lernantaj homoj per vacapo (What's up) restas almenaŭ 10. La nuna ĉapitro kiun ili lernas konsistas el "Prepoziciaj prefiksoidoj" trovebla en la libro "plena analiza gramatiko de Esperanto".

## TRAFITAJ DEFIJOJ KAJ MALFACILAĴOJ

Fakte, la instruado de Esperanto postulas tre fortikan kuraĝon de la instruisto ĉefe en Afriko. Malkuraĝuloj kaj facile malesperemaj instruistoj ĉiam fiaskas kaj stagnas aŭ marŝas retroen pro jenaj kialoj:

### 1) Pri la ĉeesta klubo

- Frua malkresko de lernantara nombro
- Manko de instrumaterialoj por lernantoj kaj instruistoj
- Foresto de konstanta kunlaboro inter E-organizaĵoj
- Malesto de kunlaboro inter Esperanto-instruistoj kaj kluboj
- Pri reta instruado
- Ofteca malinteresiĝo de lernantoj, kiuj esperas trovi dungiston per io nova akirita

### 2) Pri la reta klubo

- Malkreskiĝo de lernantara nombro pro retumada problemo kaŭze de multkosta reto

- Manko de konstanta retaliro pro multkosteco por la instruisto
- Manko de elektro-energio en konvenaj aparatoj: komputilo, telefono

La Esperanto-Klubo de LUBUMBASHI kaj La Reta klubo ambaŭ gvidataj de mi, estas tre dankaj al la Afrika Centro Esperantista kaj la Afrika Komisiono de UEA por la konsiderinde stabila subteno, kiun ili faras por helpi disvastigi Esperanton en Afriko

Mi petas vian neŝanceliĝeman kunlaboradon, nur gravas laboro, kiun ni ĉiuj faru por pluflorigi la movadon esperantan tutmonde kaj parte en Afriko.


Kore, via

**ESPOIR NGOMA KASATI**

**Lubumbashi/D.R. Kongo**

**Poŝtkesto: B.P. 1023**

**Telefono: +243 972 716 042**



## El RD Kongo: Espoir Kasati rakontas

Tio ĉi okazis en 2018, kiam mi instruis esperanton en lernejo "Complex Scolaire Herbart" en Uvira. Tie mi havis du klubojn: unu por infanoj, kiujn vi povas vidi sur la bildo (ĉiuj tiuj infanoj scipovas esperanton) kaj la alia klubo estas por junuloj en la sama lernejo.

Pri la suba bildo sur kiu mi videblas kun aliuloj ĉirkaŭ la tablo: Tiu foton oni faris dum la kvina esperantologia semajno organizita de la Esperanta Civito. Tiu blankulo apud mi nomiĝas Georgio Silfer kaj la blankulino estas Perla Martinelli.



*Espoir Kasati*





## Kiuj estas la irokezoj?

Roger Nilsson sciigos vin.



*La bildo temas pri irokezoj en la 17a jarcento.*

Irokezoj estas ĝenerala esprimo por la ses irokezaj popoloj kiuj estas parto de la Irokeza Ligo, triba konfederacio en kiu hodiaŭ estas la nordorienta Usono kaj sudorienta Kanado. La Irokeza Ligo estis formita ĉirkaŭ 1600 (1570 laŭ la historio de la irokezoj) en la konsilo de ĉefoj Hiawathas kaj Dekanawida por antaŭenigi finon al la eternaj tribaj militoj.

En sia propra lingvo, ili kolektive nomas sin Haudenosaunee, "la homoj en longdomoj". La triboj ofte estas nomitaj Ses Nacioj en angla literaturo: mohikano, oneida, onondaga, cayuga, seneca kaj tuscarora. La origina konfederacio konsistis el kvin triboj, sed la Tuscaro tribo de Norda Karolino aliĝis al la unio en 1722 kaj estis permesita ekloĝi inter Oneida kaj Onondaga.

La patrujo de la irokezoj situis en la norda parto de la ŝtato Novjorko, inter la Adirondack-montoj kaj la Niagaro. La historio de la irokezoj povas esti arkeologie spurita reen al almenaŭ 500 p.K, kaj eble devenas de ĉirkaŭ la jaro 2000 a.K.

La politika sistemo de la Irokeza Unio estis unika kaj ebligis la irokezan dominecon dum la unuaj du cent jaroj de la Amerika kaj Kanada kolonia historio. La membroj de la Irokeza Ligo neniam havis tre multajn loĝantojn, tamen ili gajnis venkon post venko super nombre superaj malamikoj. Ili havis aliron al pafiloj de la Nova Nederlando, sed la supereco de la irokezoj estis plejparte pro sia unueco, celorientiĝo kaj supera politika organizo. La Irokeza Ligo estis formita antaŭ ol la unuaj eŭropanoj metis piedon en la nova mondo kaj tial mankas eŭropaj influoj. La sindikata organizo anstataŭe ludis rolon kiel modelon por la divido de potenco en la usona konstitucio.

La konstitucio de la Irokeza Ligo estis Kainerekowa (Granda Paco) kiu simple preskribis ke la irokezoj ne mortigu unu la alian. Ĝia organizo estis preskribita per 114 wampum-zonoj. La Grandioza Konsilio de la

irokezoj konsistis el kvindek saĥemoj aŭ pacgvidantoj. Ĉiu membrotribo havis certan nombron da membroj en la konsilio: Onondaga 14, Cayuga 10, Oneida 9, Mohikano 9, kaj Seneko 8.

En gravaj decidoj, la unio aperis kiel ununura tribo kie la "reprezenta domo" konsistis el du ĉambroj: la ĉefoj (saĥemoj) kaj la t.n. "la pinoj", aliaj elstaraj viroj.

La membroj, kiuj estis elektitaj al parlamento porvive, estis elektitaj fare de la virinoj. Virinoj estis konsideritaj kiel kapablaj influi la vegetaĵaron, kio siavice signifis ke ili ne nur semis kaj rikoltis, sed ankaŭ posedis la teron kaj estis la estroj de siaj grandaj familioj.


En la fono estas ankaŭ irokeza vido ke la ses nacioj ne rezignis sian sendependecon sub la traktato. Tial ili rifuzas pagi impostojn al la Ŝtato de Novjorko kaj al la Usona Federacio. Ili administras sian komercon iom malfacile, ĉar Kanado kaj Usono – same kiel Svedio – ne akceptis la Deklaracion de UN pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj. Sed ili konsideras sin memstara nacio kaj dum la dua mondmilito ili deklaris militon al Germanio.

/Roger



*Irokezaj virino kaj viro de la Kahnawake-areo.*





*Irokeza "longdomo". Atentu la fumon el la "kamentuboj".  
Devas esti malhela intere, nur brilo de la fajro.*

## La signifoj de la nomoj de la Usonaj ŝtatoj

de Roger Nilsson



Ŝtato	Lingvo	Signifo
Alabamo (Albalmo)	Choctawa	Malplenigita densejo
Alasko	Aleuta	Granda lando
Arizono	Papagoa	Malgranda fonto
Arkansaso (akakaze)	Siuoja	La homoj de la suda vento
Dakoto	Siuoja	Alianctanoj
Delavaro	Angla	Venas de Lord De La Warr, kiu vojaĝis ĉe la Delavara rivero en 1610
Florido	Hispana	Malkovrita de hispanoj la Paskan dimanĉon kaj pro tio nomata Pascua Florida, floranta Pasko
Georgia	Latina	Venas de reĝo Georgo la 2-a de Anglio
Havajo	Polineziana	Signifo necerta, eble la loko de la Dioj
Idaho (ee-dah-how)	Shosona	La suno venas de la montoj

Ilinojso (iliniwek)	Algonkina	Ili estas viroj
Indiana	Angla	Venas de la vorto Indiano
Iovao (aiyuwe)	Siuoja	Medolo
Kalifornio	Hispana	Familia nomo de fikcia insulo en romano de la 17-a jarcento
Kansaso (Kansa)	Siuoja	La ventaj homoj
Karolino	Latina	Venas de reĝo Karlo la 2-a de Anglio
Kentukio	Ĉerokoja	Signifo necerta, ev. herbejoj
Kolorado	Hispana	Venas de la rivero Rio Kolorado, ruĝa, kolorigita
Konektikuto	Algonkina	Ĉe la longa estuaro
Luiziano	Franca	Venas de la reĝo Ludoviko la 14-a de Francio
Majno	Franca	Venas de la Duko de Majno, filo de Ludoviko la 14-a
Marilando	Angla	Venas de reĝino Maria Henriette de Anglio
Masaĉuseco	Algonkina	La homoj de la granda monto
Miĉigano (michigamaw)	Algonkina	La granda akvo
Minnesota	Siuoja	Kota akvo
Mississippi	Algonkina	La patro de akvo
Missouri	Algonkina	Granda kotrivero
Montano	Hispana	Monto
Nebrasko (nebrathka)	Otoa	Plata akvo
Nevado	Hispana	Neĝkovrita
Nov-Hampŝiro	Angla	Venas de Hampshire en Anglio
Nov-Ĵerzejo	Angla	Venas de la insulo Ĵerzo en Anglio
Novjorko	Angla	Venas de la Duko de Jorko kiu ricevis la areon kiel stipendion (Jorko de la dana Jorvik)
Nov-Meksiko (Nuevo Mejico)	Hispana	Venas de la azteka dio Mexitli
Ohio	Seneca	Bela rivero
Oklahomo (Okla-homma)	Ĉoktaa	Ruĝaj homoj
Oregono (Ouragan)	Franca	Uragano
Pensilvanio	Latina	Arbolando de Penn, venas de William Penn
Rod-Insulo	Angla	Venas de la insulo Rodiso
Teksaso	Kadda	Aliancanoj
Tenesio	Ĉerokoja	Eventuale post la ĉerokea urbo Tanassee
Utaho	Uto-Azteka	Venas de la "uta homoj"
Vajomingo (mechewe-ami-ing)	Ĉerokoja	Sur la grandaj preroj
Vaŝingtono	Angla	Venas de George Washington
Vermonto (Vert mont)	Franca	La verda monto
Virginio	Latina	La Virgulina lando, venas de Elizabeto la 1-a de Anglio
Viskonsino (wees-konsan)	Chippewa	La akvokolekto

# Investo en la minoritataj lingvoj

**Jeanette Gustafsdotter** estas ekde novembro 2021 la kulturministro de la socialdemokrata registaro en Svedio. **”Sed kial ne investi en la internacia lingvo Esperanto”, demandas sin Inga Johansson. ”Nun, kiam venas ukrainaj rifuĝintoj, ni vere bezonas mondan lingvon. Esperanto ja parte havas radikojn de la jida lingvo, kiu estas unu el la kvin protektindaj minoritataj lingvoj en Svedio”.**



Jen la ĉefaj investoj en minoritataj lingvoj:

## 1. Lingva prizorgado kaj lingvoevoluo.

Minoritataj lingvoj devas esti evoluigitaj kaj modernigitaj por fariĝi utilaj en moderna socio. Ni faciligas lingvotransdonadon inter generacioj per pliigita monsubteno. La monsubteno por la samea lingvocentro estis pliigita kaj novaj lingvocentroj estas komencitaj por la finna, jida, meänkieli kaj romani chib. La financado de la Samea Lingvo-Centro estis pliigita. Ankaŭ lingva prizorgo estas plifortigita por ĉiuj lingvoj.

**2. Plialtigi scion kaj videbligi la minoritatajn lingvojn.** Scio pri la rajtoj kaj lingvoj de naciminoritatoj ofte mankas. Tial la Distrikta Gubernia Administrado de Stokholma kaj la Samea Parlamento evoluigis edukadon pri minoritataj lingvoj por urbaj kaj regionaj oficistoj.

**3. Kohera eduka ĉeno.** Edukado en la minoritataj lingvoj devas esti disponebla, de antaŭlernejo ĝis universitato. La superaj edukaj institucioj respondecaj pri minoritataj lingvoj ricevas financadon por la laboro de revivigo kaj konservado de minoritataj lingvoj kaj por kontribui longtempe al plifortigo de la provizo de kapabloj por minoritataj lingvo-kvalitoj ĉe dungitoj en la publika sektoro.

## 4. Dumviva lernado kaj la lingvoj de la laborvivo.

Lerni minoritatan lingvon kiel plenkreskulo povas rekonkti al perdita kulturo. La Popolkleriga Konsilio ricevas financadon por popolkleriga agado en kaj pri minoritataj lingvoj tra la tuta lando kaj pli da edukaj vojoj por lingvouzantoj. Subteno por la rajtoj de naciminoritatoj ankaŭ estas disponigita por personaro en sanservo, maljunulprizorgo kaj sociaj servoj.

## 5. Kulturo portas lingvon kaj lingvo portas kulturon.

Vivanta lingvo estas antaŭkondiĉo por vivanta kulturo. La Sveda Konsilio por Kulturo efektivas iniciatojn pri legado kaj literatura reklamado en minoritataj lingvoj kun fokuso al infanoj kaj junuloj. Subteno por la Finna Kultura Instituto en Svedio pliĝis. En 2022, la Sveda Filminstituto plifortigos sian laboron per lingvaj plifortigaj filmaj pedagogiaj iniciatoj.

*Antaŭenigi kaj konservi minoritatajn lingvojn estas ampleksa tasko. La nova nacia agadprogramo estas grava paŝo por certigi, ke la lingvoj vivu kaj garantii vivajn naciminoritatajn kulturojn en Svedio.*

**Jeanette Gustafsdotter, Ministro de Kulturo**

***Fine Inga memorigas nin pri la antaŭa kulturministro: Amanda Lind – ministro, kiu parolas Esperanton. Jen foto de ŝi, kiam ŝi sendis salutojn al la UK en Lahtio 2019 kaj jen la ligilo al ŝia parolo:***

<https://www.youtube.com/watch?v=p7Fna4MPioA>

/Siv



# La neceso uzi la ĝustajn ciferojn en adresoj

Dek gotenburganoj mendis esperanto-ĉemizojn de la germana entrepreno "Espero". 25 % de la prezo iras al organizo, kiu protektas bestojn, kiuj riskas ekstermadon. Temas pri leonoj, elefantoj kaj goriloj.

Ni ja havis T-ĉemizojn antaŭe, sed nur kun mallongaj manikoj. La sveda klimato ĉefe postulas la uzon de vestaĵoj kun longaj manikoj.

La transporto de Germanio al Svedio ne bezonis longan tempon – sed la transporto en Svedio daŭris 17 tagojn (kaj kvar telefonvokojn al "Post Nord" – La Norda Poŝto). Kial?

Do, la maŝinoj de la Norda Poŝto verŝajne nur legas ciferojn, ne literojn. Malfeliĉe la sendinto miksis du literojn en la poŝta numero de Gråbo, kaj la paketo iris al peranto en Kungsbacka – tiuokaze al la nutraĵvendejo Hemköp.

Finfine la ĉemizoj iris al Gråbo kaj en la venonta renkonto en Gotenburgo ĉiuj havos la siajn.

Mi tre ŝatas la mian. La kvalito estas bona kaj mi certe ne sentas malvarmon, portante ĝin.



**Leono kaj elefanto.**

La entreprenisto Tim en "ESPERO" kaj mi nun elspiras. Ĉio nun estas en ordo.

Alia afero, kion turistoj devas scii: En Svedio la uzo de monbiletoj kaj moneroj malkreskas. Ĉio pli kaj pli fariĝas elektronike. Swish estas ofte uzata.

/Siv

Jag vann första pris på en maskeradtävling en gång.  
Jag klädde ut mig till PostNord och dök aldrig upp.

Mi iam gajnis la unuan premion en maskobala konkurso. Mi maskis min kiel Poŝt Nord – – – kaj neniam aperis. (El Facebook)

## Ĉu ankaŭ la vikingoj havis zorgojn pri la klimato?

En noveldonita sveda libro, *Rökstenen och världens undergång* de Henrik Williams, la verkisto, kune kun tri aliaj ekspertoj, proponas novan interpreton de la plej fama runŝtono de Svedio, *Rökstenen*, starigita ĉ. 800 pKr. La teksto estas treege malfacile interpretebla, ĝi enhavas enigmojn kaj magiajn runojn. La teksto komenciĝas jene:

"Post Våmod staras tiuj ĉi runoj. Sed la patro Varin skribis ilin memore de mortstampita filo." Laŭ la nova teorio la ŝtono rakontas i.a. pri klimata katastrofo, kiu okazintus iom pli ol 250 jarojn antaŭ la starigo de la ŝtono. En la jaro 536 fakte okazis vulkana erupcio, kiu ŝanĝis la klimaton tiutempe.

(El *Populär Historia*.)

# Puŝiĝi en la muron

Britt Zenth, svedino loĝanta en Danio, havas ja jenan en sia Facebook-paĝo.

**Att "gå in i väggen" är som de 7 dvärgarna i Snövit..**



Först blir man Trötter  
- Man orkar ingenting,  
inget spelar nån roll.



Sen blir man Prosit  
Immunförsvaret  
försvinner



Sen blir man Blyger  
Man orkar inte  
träffa människor



Sen blir man Kloker  
Man börjar omvärdera  
livet och man ser  
livets mening igen



Sen blir man Butter  
Ledsen, dämpad och  
arg på allt.



Till sist blir man  
Glader  
Man blir stark,  
man vågar säga  
nej och man känner  
glädje igen.



Sen blir man Toker  
står inte ut med  
något eller någonting.

"Puŝiĝi en la muron" (esti tro elĉerpita) estas kiel la 7 nanoj kaj Neĝulino..

1. Unue oni fariĝas Laculo. Oni eltenas nenion, nenio gravas.
2. Poste oni fariĝas Timidulo. Oni ne emas renkonti homojn.
3. Poste oni fariĝas Morozulo, malgaja, silentema kaj kolerema je ĉio.
4. Poste oni fariĝas Frenezulo, eltenante nenion.
5. Poste oni fariĝas Ternulo. La imundefendo foriĝas.
6. Poste oni fariĝas Saĝulo. Oni komencas nove difini la valoron de la vivo kaj oni denove spertas la sencon de la vivo.
7. Laste oni fariĝas Gajulo. Oni fariĝas forta kaj oni kuraĝas nei kaj oni denove sentas gajecon.

Ĉu ie troviĝas la ĝustajn esperantajn nomojn de la sep nanoj? Mi serĉis, sed ne trovis. /Siv

# Svedaj pioniraj inoj

(daŭrigo de numero 50)

## 3. Elfrida Andrée, la unua katedrala organisto en Svedio



Elfrida Andrée, (1841–1929) estis komponisto, dirigento kaj la **unua virino, kiu ekzameniĝis organisto**. Krome ŝi ankaŭ estis la **unua virina telegrafisto** en Svedio, sed ŝi ne multe laboris en tiu profesio. Ŝi dediĉis sin al la muziko.

En la hejmo ĉe la placo de Visby, Gotland, ŝia patro, Andreas Andrée, ofte aranĝis muzikajn vesperojn. Li instruis ŝin en orgenludado, kaj poste ankaŭ kantoj en Visby trejnigis ŝin.

Ĉar virinoj tiutempe ne rajtis havi edukon ĉe la orgenklaso de la Muziko-Akademio, la patro aranĝis ke Elfrida ricevis privatan edukon de organistoj en Stokholmo. Post du jaroj la nur 16-jara Elfrida povis fari privatan ekzamenon kiel organisto.

Ŝia tiama instruisto, la profesoro Mankell, efikis ke ŝi poste povis anstataŭi la ordinaran organiston en la preĝejo de Jakobo en Stokholmo dum la somero. Tion la pastroj de la paroĥo vere ne ŝatis.

Gotenburgo estis la plej granda havenurbo kaj multaj el la politikistoj apartenis al la liberala partio. Unu el ili estis S.A.Hedlund, redaktisto de la liberala gazeto Göteborgs Handels- och Sjöfarts-tidning kaj li ankaŭ estis parlamentano. Li laboris por virinaj rajtoj al postenoj, kiuj je tiu tempo estis malpermesitaj. En 1861 la parlamento deklaris ke virinoj rajtas havi postenojn kiel organistoj.

En 1866 la ofico de organisto en la Katedralo de Gotenburgo estis vaka. Andreas Andrée admonis sian filinon kandidatiĝi por la posteno – kaj ŝi sukcesis. En 1867 ŝi ekoficis kaj ĝis sia morto ŝi havis tiun postenon.

**Kiel komponisto de ĉambra muziko kaj simfoniaj verkoj, ŝi estis ina pioniro en Svedio, kio validas ankaŭ por ŝiaj agado kiel orkestra direktisto.**

Ŝi fariĝis membro de la Reĝa Akademio de Muziko 1879 kaj en Litteris et artibus 1895. En 1908 ŝi ricevis stipendion ĉe la Virina Akademio de Idun 1908.

Jen ligilo al ŝia Piano Quintet in E. minor:

<https://www.youtube.com/watch?v=-WE1p4k3qkg>



## 4. Karolina Widerström (1856–1949), nia unua ina kuracisto

Karolina Widerström naskiĝis en Helsingborgo kiel la sola filino en sia familio. De la komenco, ŝia patro volis ke ŝi iĝu gimnastika instruisto kaj kiam la familio translokiĝis al Stokholmo en 1873, ŝi studis ĉe

la Centra Gimnastika Instituto 1873–1875. Dum la venontaj du jaroj, ŝi estis parte dungita kiel asistanto de profesoro Branting, kaj parte ŝi praktikis private kiel



fizioterapiisto. Post instigo de Branting, Karolina Widerström komencis studi medicinon en 1880, unue en la Universitato de Upsalo kaj poste en Karolinska Institutet, Stokholmo.

En 1884 Karolina Widerström iĝis la unua virino, kiu fariĝis bakalaŭro en medicino ĉe Karolinska Institutet, Stokholmo.

Kvar jarojn poste, en 1888, ŝi ricevis sian diplomon pri medicino kaj fariĝis, kiel **la unua virino** de Svedio, aprobita kuracisto kaj specialiĝis pri virina medicino kaj ginekologio. La sekvan jaron, ŝi malfermis ginekologian klinikon en Stokholmo, kiu fariĝis tre populara. Virinoj vicumis ĉe la ŝtuparo por vidi la kuraciston.

Karolina Widerström estis antaŭulo de seksa edukado. En 1889 ŝi skribis eseon pri "La inaj genetaloj, iliaj funkcioj kaj iliaj plej oftaj malsanoj" en kiu ŝi publikigis bildojn de genitaloj, io kiu estis tre aŭdaca tiutempe. Ŝi rekomendis seksan edukadon en frua aĝo, sed samtempe konsideris grava, ke gejunuloj aŭdu pri ĉiuj pozitivaj aspektoj de sekseco. Jam en 1897, Karolina Widerström instruis pri

seksa higieno por geinstruistoj kaj adoleskulinoj. La instruado tiam estis disvastigita al lernejoj kaj seminarioj, kaj en 1907 seksinstruado estis lanĉita en preskaŭ ĉiuj knabinaj lernejoj en Stokholmo.

Aldone al ŝia implikiĝo en seksa edukado, Karolina Widerström ankaŭ estis mova forto en aliaj temoj **koncerne la rajtoj de virinoj**. Ŝi estis engaĝita en la batalo kontraŭ prostituado kaj rekomendis socian protekton por needziniĝintaj patrinoj.

Ŝi ankaŭ laboris pri helplaboro por ekspluatitaj kaj mistraktitaj virinoj. En 1933, ŝi estis promociita al honora doktoro de medicino ĉe Karolinska Institutet.

Karolina Widerström estis multmaniere pioniro, kaj en sia laboro kaj en la politika areno. Ŝia engaĝiĝo por virinoj daŭris ĝis ŝi mortis en 1949. /Siv



## Printempa promeno de "Järntorget" laŭ "Linnégatan"

"Järntorget" floras en rozkoloro, kiam mi turnas min en la komenco de "Linnégatan".

La nova hotelo "Draken" leviĝas al la ĉielo kaj kiam mi antaŭe preterpasis "Folkets hus", mi vidis, ke la blankaj literoj "Draken" estis metitaj supre, ĝi ankaŭ diris, ke ĝi estas hotelo. Hoteloj malabundas en Gotenburgo en la lastaj jaroj.



Domo post alia laŭ Linnégatan brilas konkure al la suno mem laŭ mia vojo. Ĝuste en tiu ĉi parto de la urbo loĝis la "noblaj homoj".

Mia patro rakontis al mi, kiel li devis liveri viandon al ĉi tiuj adresoj, kie loĝis la "bonaj" familioj. Avo havis buĉbutikon en la malnovaj bazaroj sur "Kungstorget". Pensoj flugas tien kaj reen dum mia promenado.



Mi admiras la malgrandan elstarajon plej alte, kies tegmento trembriletas kiel oro. Kiajn dezirojn iu havis tiutempe en ĉi tiu subtegmenta etaĝo. Oni sentas, kvazaŭ la suno mem volas ion diri al mi, kie mi promenas inter diŝjetitaj promenuloj, kiuj havas siajn taskojn.

La bela malnova domo vidalvide al "Hagabion" donas al la promeno eĉ pli da imagoj. Hodiaŭ estas butikoj sur la stratnivele kaj sub la sunombreloj ŝajnas, ke oni trinkas 11-kafon ĉi tiun belan matenon.

Kiu loĝis ĉi tie unua kaj kian funkcion havis ĉi tiu domo? En mia mondo, ĝi povus funkcii kiel lernejo, apoteko kaj iu saninstalaĵo.

Tiuj, kiuj scivolas, verŝajne trovos la respondon, sed mi elektas pluiiri al "Linnéplatsen".



Ĉe "Hagabion" ĉiam estas vivo kaj movado. La plej spektakla estas verŝajne la filmfestivalo, kiu okazas en Göteborg ekde 1979. Estis la film-entuziasmuloj Göran Bjelkental kaj Gunnar Carlsson kiuj inspiriĝis de la Greenwich Filmfestivalo, do dankon pro tio! Kiam ne estas filmfestivalo en la malnova lernejo, vi povas fari kiel la homoj en la bildo, sidi kaj ĝui la sunbrilon.

Baldaŭ mi alproksimiĝos al la celo, kiu estas "Linnéplatsen" kie mi intencas veturi per la buso al Sjövik, sed unue mi preterpasas "Linnégatan 9", kie "La ŝipkompanio por la vaporŝipo Sofia" havis sian adreson. Estis la reĝo Oskaro la 2-a mem kiu agadis malbone al sia reĝino, Sofia. Li opiniis ke li devus anstataŭigi ŝin per pli junaj inaj konatoj kaj aliaj plezuroj, kiam li estis en Gotenburgo. En tiu tempo ekzistis konstruanto kiu posedis la proprajon kontraŭe kun adreso "Linnégatan 16". Li estis ĝenita de la malbona moralo de la reĝo. Li do murigis la vizagxon de la diablo, por ke la reĝo povu ĝin



vidi, kiam li matene levis la kurtenon. Ĝi restas ankoraŭ sur la novkonstruita domo.

Kiam mi preterpasas, mi opinias, ke la malice murigita diablo volas faraĉi ion en ĉi tiu bela tagon, sed mi pluiras. Fine mi enbusiĝas al "Sjövik" kaj sidiĝas trankvile. Alveninte en "Olskroken", la "celsigno" ekfulmis freneze "la linio ne iras laŭ la regula vojo". Subite ni estas ekstere sur la E20-vojo kaj mi cerbumas pri kiu vojo ni devas iri nun ... Foje ĉe la elirejo al la vojo al "Östra Sjukhuset", la laŭtparolilo kraketas. Estas la ŝoforo "Mi pardonpetas sed mi pensis, ke mi veturus al 'Partille' ... Sed mi turnas sur la viadukton nun ..."

Ĉu estis la Diablo ĉe la pinto de Linnégatan kiu fakte sukcesis faraĉi tion, sed kiu scias ...

/Ingegerd

---

Ĝustaj respondoj de 6 demandoj pri pilkludoj en la lasta paĝo: 1: B. 2: A. 3: B. 4: B. 5: C. 6: B.

# Poemo de dekjara Adam memore al sia forpasinta hundo Genki



La 13an de aprilo la hundo de la familio Nylén forpasis.

Patrino Rakel skribis en Facebook:

"Hodiaŭ ĉi tiu ĝentilulo endormiĝis en la aĝo de 16 jaroj. Tiom amata de ĉiuj! Vi enorme mankas al ni! Nia bela, saĝa Genki! Restu en paco!"

*"Idag har denna gentleman fått somna in i en ålder av 16 år. Så älskad av alla! Vi saknar dig enormt. Vår vackra, kloka Genki! Vila i frid!"*

## La poemo de Adamo memore al lia hundo Genki

Genki, vi signifis multon por ni!  
Tial ni volas honori vin per ĉi tiu poemo.

La korpo ne estas tiel grava kiel la animo.  
La tuta familio estis apud vi.  
Ni esperas, ke vi atendas nin en la ĉielo.  
Neniu povas anstataŭigi vin.  
Vi ĉiam restos en niaj koroj.  
Ni scias, ke via korpo estas laca nun, sed vi vivos bone en la ĉielo.  
Ni estas tiom malgajaj, sed ĉi tio estas la sola maniero.  
Vi signifis multon, multon, multon por ni!  
Vi havos tiel bonan tempon en la ĉielo.  
Vi povos libere kuri sur belegajn kampojn,  
kaj vi povos renkonti mirindajn homojn,  
ni neniam forgesos vin!  
Ripozu en paco!

**Adam 10-jara skribis svede. Mi, lia avino, tradukis. /Siv**

## Adams dikt till minne av sin hund Genki

Genki, du har betytt mycket för oss!  
Så därför vill vi hedra dig med denna dikt.

Kroppen är inte lika viktig som själen.  
Hela släkten har varit vid din sida.  
Vi hoppas att du väntar på oss i himlen.  
Ingen kan ersätta dig.  
Du kommer alltid att finnas i våra hjärtan.  
Vi vet att din kropp är trött nu, men du kommer att ha det bra i himlen.  
Vi är så ledsna, men det här är det enda sättet.  
Du har betytt mycket, mycket, mycket för oss!  
Du kommer ha det så bra i himlen.  
Du kommer kunna springa fritt över härliga fält, och du kommer kunna träffa underbara människor.  
vi kommer aldrig att glömma dig  
Vila i frid!

# Jen nia mondo!

La muzikgrupo **Duo Espera** – Jen via mondo – YouTube:

<https://www.youtube.com/watch?v=tl5Fbwr-EB4>

Rekantaĵo: Jen via mondo,           jen nia mondo  
                  kun monta neĝo           kaj mara ondo  
                  De la tropikoj           ĝis la polusoj:  
                  Jen vasta mond'       por ĉiuj ni.

1. Kiam mi iris sur voj' sen celo,           Jen supre brilis blua ĉielo  
    Kaj orregalo ŝajnis greno valo:       Jen vasta mond' por ĉiuj ni.
2. Vagante, ŝpurojn mi sekvis lerta       Kaj min turmentis soif' dezerta,  
    Dum mi sopiris, iu voĉo diris:       Jen vasta mond' por ĉiuj ni.
3. Mi la okulojn ŝirmis per mano,       Kaj mi vidis ondojn de oceano,  
    La suno dronis kaj voĉo sonis:       Jen vasta mond' por ĉiuj ni.

Ĉi tiu kanto estas la plej konata el la pli ol 1000 kantoj, kiujn verkis vaganta okaza laboristo kaj kantisto Woody Guthrie (1912 – 1967) Li estis ekzemplo por Pete Seeger, Bob Dylan kaj aliaj usonaj popolkantistoj.

Seeger pri liaj kantoj diris: "Kelkaj el ili tiom longe validos kaj ekzistos, kiom longe ekzistos homoj kiuj kantas." Guthrie kantas pri la usona revo, la grandeco de la lando, la libereco sen limoj: ĉiu povas efektivi siajn planojn sen ke aliuloj malebligos tion.

## Aira Kankkunen (1928–2010) – Esperanta verkistino en Gotenburgo

Aira Kankkunen, devena el Finnlando, estis docento pri infanaŭdiologio ĉe la universitata malsanulejo Sahlgrenska en Gotenburgo. Kiel nova pensiulino ŝi ekhavis la ideon lerni Esperanton, post kiam ŝi en stranga sonĝo vidis la vorton Esperanto antaŭ si. Ŝi membriĝis al nia esperantoklubo kaj baldaŭ komencis verki novelojn kaj poemojn en Esperanto kaj en 1992 ŝi ricevis la premion Nova talento en la Belartaj konkursoj de UEA. Ŝi eldonis pli ol 13 librojn en Esperanto, i.a. tradukon de ŝia libro pri infanaŭdiologio (Ĉu via bebo aŭdas?). Dum pluraj jaroj ŝi gvidis kurson pri verkado en nia klubo. Ŝia lasta libro estas rakontaro pri ŝia infanaĝo. Ŝi skribis ĝin en la finna por ŝiaj parencoj. Ĝi ne troviĝas en sia tuto en Esperanto, sed kelkajn rakontojn ŝi tradukis Esperanten kaj enmetis en aliaj ŝiaj verkoj. Tiujn rakontojn ni volas publikigi en Ora Ĵurnalo. Jen la unua:



# Printempo – venu!

de Aira Kankkunen


Tip-tip-tip! Ĉu vere, ĉu ili jam degelas – la pendoglacioj sur tegmentrandoj.

– Printempo alvenos, estas jam tutproksime! mi kriis kaj kuris eksteren por scii, ĉu vere la pendoglacioj, grandegaj, tutan vintron kreskintaj, nun degelas.

Tio estis unua signo de la alvenonta printempo. Ni malfiksis la pendoglaciojn. Estis danĝere lasi ilin pendu; ili ja estis pezaj kaj akraj. Malfiksiĝante spontane, ili estus povinta fali sur homon.

Post ĉi tiu agado ni atendis la sekvan, la degeladon de nia kortoglacio. Ni loĝis en lernejo; nia patro estis instruisto. La korto estis piedpremita de lernantoj dumvintre tiel forte, ke la neĝo malmoliĝis. Unue degelas movebla neĝo, poste restis nur malmola glacio, kiu iom post iom travidebliĝis, kaj tiam estis la tempo helpi la alvenontan printempon. Per fosiloj kaj ferstangoj ni dispecigis la glacieron, malfiksis la pecojn el la tero kaj renversis ilin, por plirapidigi la degeladon. Baldaŭ la tuta korto estis kiel lageto, sur kiu ni saltis de unu glacipeco al la aliaj imagante, ke ni kuras sur maraj glacipecoj. Kompreneble okazis, ke kelkaj falis kaj vere malsekiĝis, ĉar tiatempe oni ne havis la nuntempajn, akvimunajn ŝirmvestojn, sed ne gravis – ni ja havis saŭnon, kie kaj vestoj kaj infanoj rapide sekiĝis.

Kiam la suno degeligis la movneĝon ĉirkaŭ la dommuroj, ni planis nian ĉiujaran konkurson – ne permesita de niaj gepatroj – sed tamen – ĉiujare ĝi okazis. Ni konkursis pri tio, kiu unue sukcesos nudpiede ĉirkaŭkuri la domon sur senneĝa randumo, nur kelkajn centimetrojn larĝa. Oni ne rajtis treti sur la restantan neĝon. Ĉiuj ja ne sukcesis kaj pro tio ni daŭrigis la konkurson per nudpieda



ĉirkaŭkurado sur la glacia neĝo. Li aŭ ŝi, kiu ĉirkaŭkuris la domon plejmultfoje, estis nia heroo.

Kiam mi estis sufiĉe aĝa – 5–6 jara, por partopreni en la konkurso – tri infanoj el nia familio partoprenis. Kelkfoje kunestis eĉ najbaraj infanoj. Kvankam ni komencis la konkurson treege silentaj, por ke la gepatroj ne sciu, tamen nia bruo grandiĝis ĉiufoje, kiam unu el ni faris sian kuradon. Sed – nun la gepatroj aŭdis la bruon kaj divenis, kio okazas. Ili ekvenis eksteren kaj – laŭ la finnaj manieroj – ili ordonis la tutan aron en la saŭnon, kiu ĉiam estis varma, eĉ se ne banvarmega. Tie ni varmigis niajn blu-ruĝajn piedojn en varmega akvo. Kurante ni tute ne sentis malvarmon. Laŭ mia memoro ni neniam malsaniĝis, kvankam pro la timo de malsaniĝo la gepatroj ne akceptis la konkurson.

La printempo venis, degeligis neĝon kaj glacieron. Ni atentis treege serioze naturon, kaj migrobirdojn kaj plantojn. Birdoj vintron ĉerestantaj: pigoj, kornikoj, paruoj kaj bombiciloj komencis serĉi partnerojn. Ili ne

plu estis dependaj de homdonitaj nutraĵoj. Ili transloĝiĝis al arbaroj. Ni rigardadis la ĉielon aŭskultante, ĉu jam aŭdiĝas printempaj trumpetoj: "Hoo-hoo-hoo", kantoj de cignoj, kiuj kutimis transflugi nian lokon ale al malpliproksima nordparto. Gruoj transflugis preskaŭ ĉiam silentaj, sed ilia flugado – plugilforma – estis treege interesa. Gruoj restis sur proksima marĉo, kie ili dancis, ludis siajn trumpetojn, nestis kaj manĝis ranojn.

Ni atendis la alaŭdojn, kiuj alveninte arkoflugis alte super la grenkampoj, kvivitflugetis, flugilbatis samloke longan tempon kaj subite plonĝoflugis suben per kunmetitaj flugiloj. Oni ja diras pri la alveno de somero: *Ekde alveno de alaŭdoj unu monaton, post fringoj duonmonaton, post motacil-alveno nur iom da tempo, jen somero – venis hirundoj.*

La unuaj tusilagoj subrigardis singarde jam tiam, kiam troviĝis nur malgrandaj senneĝaj lokoj. Ho! kiel mi ŝatis ĉi tiujn flavajn

floretojn, vizitkartojn de printempo.

Finnlingve oni nomas ilin "folio de vidvo". Pro la nomo de la floro ni ne kutimis kunporti ilin hejmen, nek botaniki kaj sekigi ilin sub presilo por uzi ilin por salutkartoj. Iam mi faris tion, sed pro la konsilo de mia fratino mi neniam sendis miajn memfaritajn belajn salutkartojn – tusilagajn.

La vera printempo komenciĝis tiam, kiam betuloj vestis sin en helverdaj burĝonoj, "en mus-oreloj", kiel ni nomis betulburĝonojn. Ili balanciĝis en printempa vento, invitis eksteren por flari printempan odoron, iom rezinan. La suno brilis tra la branĉoj kaj aŭdiĝis: kŭooovi-kŭooovi-kŭooovi – la kurlo kantis sur la proksima lago.

Tio okazis antaŭ multaj jaroj en norda Finnlando, sed la sama intensa atendado de printempo ĉeestas daŭre ĉe mi. Rigardante glacio-kovrilon sur mia pado, mi ne povas preterpasi ĝin sen piedbati, por dispecigi ĝin – por ke eĉ iom plirapidigi la printempon.

## 6 demandoj pri pilkludoj



La ĝustaj respondoj troviĝas en p. 35.

**1.** Origine la pilko estis farita el korko kaj ŝnuro, sed nuntempe ĝi estas farita el plasto kun signala koloro. Kiu ludo?

A. Pelota B. Glitpilko (Bandy) C. Lacrosse

**2.** La ludon Basse oni foje nomas la futbalo de malriĉuloj, ĉar la pilko estas farita el kaŭĉukaj fadenoj kaj biciklaj radtuboj. Basse evoluiĝis komence de la 1900-aj jaroj, sed en kiu lando?

A. Norvegio B. Danlando C. Svedio

**3.** En la kegloludo Bowling *strike* signifas renversi dek keglajn per unu trafo. Kiom da *strike* sinsekve endas por t.n. perfekta serio?

A. 10 B. 12 C. 14

**4.** En kiu pilkludo troviĝas la sekvaj terminoj: *fummel*, *punt* kaj *sack* ?

A. Rugbeo B. Usona futbalo C. Basbalo

**5.** Kiam naĝado populariĝis en la 1860-aj jaroj oni inventis akvosportojn baze de "surteraj" sportoj, ekz. akvopilkadon. Kiu lando estas plej prosperinta en akvopilkado dum la Olimpikaj Ludoj?

A. Kroatio B. Italio C. Hungario

**6.** En kiu sporto la pilko havas t.n. *dimples*, etajn kavaĵojn sur la surfaco?

A. Rajdpoloo B. Golfo C. Lacrosse

(El *Populär Historia*.)